★ KOLEKTO "PACO-LIBERECO" Nº 1ª ★

# NOVA GVIDLIBRETO POR SOLDATO EN ĈIUJ LANDOJ




2867

Prezo: 10 Centimoj

10

# Kolekto "Paco-Libereco"

1. Nova Gvidlibreto por Soldato en ĉiuj landoj trad. Fi-Blan-Go kaj Ludoviko . . . Frk. » 10

TUJ APERONTAJ:

2. Al la Virinoj, laŭ Urbain Gohier — kaj Tre interesa letero de Ĥino pri la milito en Ĥinlando trad. Fi-Blan-Go.

3. Patrujo, Milito, Soldatejo el Ch. Albert trad. Fi-Blan-Go kaj P. Lévy.

4. Militarismo, el Domela Nieuwenhuis, trad. G. Bastide.

5. Kontraŭpatriotismo el Gustave Hervé, trad. Ludoviko.

No 1a

Eldonaĵoj de Asocio "PACO-LIBERECO"

45, rue de Saintonge, Paris IIIa (Franclando)

# *Nova Gvidlibreto por Soldato*

*en ĉiuj landoj*

Trad. FI-BLAN-GO kaj LUDOVIKO

For la armiloj! Ni unuiĝu!
Kaj por la Paco ni bataladu!
Dank' al Esperant' okazos iam
Ke la milito forestos ĉiam.

F.-B.-G.

* 1906 *

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| PREZO | 1 ekzemplero, | Fr. 0.10 | afrankite, Fr. | 0.15 |
| | 10 ekzempleroj, | Fr. 0.90 | — | 1.15 |
| | 100 ekzempleroj, | Fr. 7.50 | — | 8.50 |

# ANTAŬPAROLO

Ĉe la kvar anguloj de l'mondo estas homoj : Scienculoj, filozofoj, literaturistoj, spiritlaboristoj aŭ manlaboristoj, unuvorte liberaj pensuloj kaj konsciaj laboristoj, kiuj pensas, ke estas io pli bona por fari, ol enigi en la kapon de la junuloj absurdajn kaj kruelajn ideojn, por igi el ili brutojn.

Ili pensas, ke estas sociala justeco por fari, kaj ke tio povas fariĝi nur per homoj, ĉe kiuj oni estos enradikinta ideojn afrankajn kaj humanajn.

Sed ili kredas ankaŭ, ke ili ne devas ĝui la helpon de aliaj ol si mem por fari tiun ĉi edukitecon aŭ ili ne atingos la celon, kaj eĉ neniam ili alproksimiĝos.

Tiu ĉi maniero ankaŭ gvidis la riprezentantojn de la laborista klaso ĉe la deka kongreso de la » borsoj de l'laboro «, okazinta en Alger dum septembro 1902ª, kiam ili decidis la eldonon de broŝuro, kiu konsistas el la sciigo al la filoj de l'popolo en ĉiuj landoj, ke ili estas faritaj por interkonsenti kaj ne por mortigi unu la alian.

La komitato federala de la « borsoj de l'laboro « en Franclando kaj kolonioj estas feliĉa efektivigi tiel belan decidajon, kvankam estas tre malfacile, montri en tiel malgranda broŝuro, kiel estas malaminda la militservado kaj ĝia celo : la milito, la haltigado de la justaj ribeloj, kaj la subteno de la socialaj maljustegaĵoj.

Fine ni nur mallonge ripetos tion, kion aliaj diris pli bone ol ni ; sed tio estas nenio, ĉar ni havas la konvinkon, ke vero devas esti diskonigata per ĉiuj tonoj kaj per ĉiuj ehoj.

I

# LA PATRUJO

Niaj gepatroj kaj niaj geavoj, ĉiuj niaj kompatindaj praavoj profitis kaj estis precipe la suferantoj de tiu magia vorto: Patrujo, ĉar ĝi estas unu el la vortoj kiuj la plej servis la dusencaĵojn kaj la mensogojn. Ĝi estas unu el la vortoj, kiuj la plej fluigis homan sangon.

Kiom da trompitoj faris tiu vorto! Kiom da suferantoj ĝi faris!

Estas necese, ke oni penu, por ke plu tion ĝi ne faru, dirante tion, kio ĝi estas, senmaskigante tiujn, kiuj ĝin ekspluatas por sia profito.

∴

Niaj patrinoj, penetrataj de tiu malaminda antaŭjuĝo inter multe da aliaj, nin lulis per kantoj patriotaj dum niaj patroj nin amuzis per militaj rakontoj. Ni pli grandiĝis ĉiam aŭdante paroli pri tiuj, kiuj vivis per la milito aŭ kiuj mortis sur la batalkampoj.

Oni plezuriĝis admirigi al ni la heroojn, kiuj mortigis multe el siaj similaj.

En niaj junaj cerboj, anstataŭ ol plivastigi niajn bonajn instinktojn: instinktojn amajn, instinktojn humanajn, oni penis por plivastigi la malbonajn; la instinkton malpacan, mortigantan, kruelan; la instinkton brutan.

Anstataŭ ol admirigi al ni la bonecon, anstataŭ ol lasi nin kompati la malfortecon, oni deziris, ke ni gloru la militon, kaj respektu la fortecon.

Niaj unuaj ludiloj estis glavoj, pafiloj, kaskoj, standardoj. Oni nin kutimigis, tuj de la plej juna aĝo, por ami la uniformon, ĝin miksante al niaj ludiloj; por manumi kun ia prefero, instrumentojn per mortigado. Post la vespermanĝo, sub la lampo, atendante la dormon reparantan de la laceco de niaj militamaj ludiloj, ni pasigis horojn manumante piedsoldatojn kaj plumbajn rajdantojn. Nia plezuro, por nin ripozi post la soldatludo aŭ post la kurado antaŭ

la regimentoj estis elmortigi image multe da malamikoj per kupraj kaj lignaj bombardiloj en kartonaj fortikaĵoj.

Fariĝinte pli grandaj, laboremaj kaj malpli bruantaj, la libroj de bildaroj, en kiuj ni ŝernis la legadon, estis proksimume ĉiuj dediĉitaj al la soldatoj kaj al la bataloj. Niaj legolibroj enhavis multe da rakontoj pri heroaĵoj sur la batalkampo. Malmulte da loko restis por paroli al ni pri scienculoj, artistoj, pri ĉiuj eltrovantoj, pri ĉiuj, kiuj elpensis utilaĵojn, pri tiuj, kiuj kelkafoje, lasis sian vivon en scienca eksperimento aŭ sindona faro por savi aŭ helpi siajn similajn.

Tiel, ofte nekonscie, al ni estis donita falsan spiritan direkton, kiun la lernejo finis per sia instruo de la historio kaj per multaj malfortaĵoj de sia leĝa instruado.

*
* *

La Patrujo, oni diras, estas la lando, kie ni naskiĝis, kie ni vivas, kie ni laboras, kie ni partoprenas al la komuna vivo.

Ni devas ami nian landon.

Sed ĉu ni ĝin ne amas, ĉar ni volas la feliĉon per la konsento de tiuj, kiuj en ĝi loĝas, kiel ni volas la feliĉon per la konsento de tiuj, kiuj loĝas trans montoj, riveroj kaj maroj? Ĉu ni ĝin ne amas, ĉar ni amas eĉ tiujn, kiuj loĝas ĉirkaŭ ĝi en la landoj, kiuj diferenciĝas de la nia per la lingvaĵo, la moroj, la kutimoj kaj la klimato?

Nia lando estas Franclando, Ruslando, Britlando, Germanlando, Itallando, Hispanlando..., kiun ni devas ne nur ami sed ankaŭ servi.

Kio estas Franclando, Ruslando, Britlando, Germanlando, Itallando, Hispanlando ...? Ĉu tio estas vorto sur oficiala papero? Ĉu tio estas peco el la ŝtofo nomata standardo? Ĉu tio estas registaro, administracio, t. e. kelkaj neutiluloj prenantaj gravan mienon por ekspluati la laboron de la aliaj? Ĉu tio estas heredaĵo de reĝoj, imperiestroj kaj generaloj? Ĉu tio estas spaco de teritorio, tiuj riveroj kaj tiuj montoj, tiuj ebenaĵoj aŭ tiuj urboj?

Ne pli por Franco, ol por Anglo, Germano aŭ Ruso; neniu el ĉio tio faras nian landon. Estas neniu ĝis, kiam estos homoj grupigitaj por produkti aŭ por konsumi tion, kio estas necesa por la vivo. Nia lando povas esti nur ricevaĵo de komuna kaj solidara vivo. Kaj sekve, la vera patrio-

tismo, la sole utila kaj aktiva konsistas, ĉiu laŭ sia povo, el la konservado de la komuna vivo, el la plibonigo de la kondiĉoj de ekzisto interne de ĉiu nacio.

La solaj, kiuj havas la rajton diri, ke ili amas sian landon, tial ke ili tion pruvas, estas ĉiuj, kiuj laboras, ĉiuj, kiuj produktas. La kamparano, kiu plugas, la laboristo, kiu fabrikas, la elpensinto, la scienculo, la artisto, kiuj kreas bonstaton kaj belecon por ĉiuj; la revoluciuloj, kiuj, per sia energio, sia ekzemplo, fortiras la timemajn amasojn al la akiro de pli da sociala justeco. Ĉu tiuj-ĉi ne estas la veraj patriotoj?

Sed tiu ĉi patriotismo, ĝi ne estas oficiala, ĝi ne estas tiu, kiun oni instruadas ĉe la lernejo; ĝi ne estas religio; ĝi estas nek mensogo, nek rimedo por sklavigo. Tial niaj regantoj, niaj bone-pensantoj ne ĝin akceptas. Estas necesa al ili malLarĝa patriotismo, kiu estu vere malsprita religio, kiel ĉiuj religioj. Al ili estas necesa fanatikiganta patriotismo, ĉar la fanatikeco estas bonega rimedo por regi la homojn.

Estas necese ke, nur elparolante tiun vorton: « Patrujo » nekonsciuloj povu esti kondukataj al ĉiuj aventuroj, fari ĉiujn krimojn aŭ senkulpigi kaj glori ĉiujn, kiuj ilin faras.

Estas necese, ke per tiu vorto, oni povu ŝteli, moki, sklavigi, bestigi de patro al filo, kiel oni tion faras de antaŭ unu centjaro.

Ĉiuj malgloroj, ĉiuj kruelajoj, ĉiuj malbonaj aferoj, ĉiuj mensogemaj programoj havis tiun vorton kiel devizon: Patrujo!

Por tiu vorto oni varbas nin dum kelkaj jaroj, por igi nin sklavoj, eble mortigantoj aŭ suferantoj pro la bruteco de la estroj.

Por la Patrujo, oni premegas nin per impostoj; por la Patrujo kaj ĝia armeo, oni eltiregas nian monon; por la Patrujo, ni estas kurbigataj dek-du kaj dek-kvar horojn ĉiutage sur besta laboro por malsatiganta salajro. Por ke la produktajoj naciaj triumfu sur la internacia vendejo, la laboristoj devas krevi (1) pro malsato laborante. Tamen la mastroj — bonaj patriotoj — dungas ĉiam la fremdajn laboristojn, se nur tiuj-ĉi konsentas labori por salajro malpligranda ol iliaj kamaradoj sampatrujanoj kun iliaj mastroj. Se ili trovas fremdajn materialojn aŭ produktajojn pli malkare, la mastroj rapidas por ilin uzi.

Se estas internacia konsento inter la mastroj por

---

(1) Triviala esprimo por « morti ».

ekspluati, subpremi plie la laboriston, ili ĝin ne preterlasas.

Kiam ili volas pruvi al ni, ke ni devas resti malriĉaj, malfortaj, submetataj, kuraĝaj kaj honestaj por la laboro, tio estas ĉiam la intereso de la Patrujo, kiu estas alvokata de la riĉuloj, de la mastroj, de la oficiroj kaj de la registoj.

Tiu ĉi vorto "Patrujo" estas soligita sur la afiŝoj, sur kiuj kandidatoj promesas la samajn reformojn, kiujn, promesis iliaj patroj al niaj patroj, iliaj avoj al niaj avoj.

Tiel longe, kiel tiu-ĉi malsprita religio de la "Patrujo" daŭros timigi nin, t. e. tiel longe, kiel ni ne vidos klare en la ludo de ĝiaj pastroj, ni estos aukoraŭ sklavoj.

Jen estas sufiĉe da mensogoj kaj absurdoj, estas tempo por fini tiun ĉi funebran komedion.

Al la homoj kiuj ĉiumomente diras al ni : la Patrujo postulas, la Lando petegas, estas tempo por fermigi la buŝon unu fojon por ĉiujn.

La Patrujo estas nur vorto. Per tiu vorto estas farita la armeo, kaj per tiu vorto ĝi estas konservata.

II

# LA ARMEO

La plej malbonega konsekvenco de patriotismo estas militarismo.

Militarismo naskiĝis la tagon, kiam iuj prenis por si tion, kio apartenis ĉies, kaj decidis ĝin konservi eĉ per la forteco.

Militarismo naskiĝis la tagon, kiam kelkaj homoj volis trudi al ĉiuj sian volon. La aŭtoritato ne povas stari sen la militarismo, sen la rimedoj por sin konservi per la forteco, kontraŭ kia ajn kontraŭstaranto.

La armeo, oni diras, estas por la nacia defendo.

Nun, ĉu oni defendas nacion, kiam oni igas sin mortigi por la utiloj de kelkaj ?

Ĉu oni defendas ion, ĉar la ĉefakondiĉo, kiu postulas la defendon estas la atako?

Kiu do nin atakas?..... kial oni nin atakus?..... Por preni nian bienon ? Ni ne havas.

Ne! la militarismo estas rimedo por sklavigo.

La soldatejo faras el ni maŝinon por obei, kiel ĝi faras el ni maŝinon por briligi kaj por paŝi. Estas necese, ke ni obeu al la ordonoj la plej idiotaj, la plej kontraŭdiraj, la plej malbonmoraj, la plej maldelikataj. Estas necese, ke ni obeu kiel hundo, kiu sentas levata sur si la vipon de la mastro. Tiu vipo estas la leĝaro, kiu punas morte ĝeston maldecan, movadon ribelan. Obei kiel malkuraĝulo, ĉar oni ĉiam timas, ke eĉ obeante oni estos tamen punata.

Ankaŭ el la soldatejo oni revenas havante la kulton de la forteco bruta, la religio de la perforto. La profesiaj militistoj, la oficiroj al kiuj oni nin liveras, korpon kaj animon, dum kelkaj jaroj — kaj tio je aĝo kiam, preskaŭ ankoraŭ infanoj, ni suferas tiel facile ĉiujn influojn — la oficiroj formas en la nacio kaston apartan, veran kaston da brutoj. La plej bona oficiro, la militisto perfekta, estas tiu, kiu montriĝas ĉe ĉiuj cirkonstancoj la plej perfekta bruto. Kiaj povas esti, la inteligenteco kaj la karaktero de homoj kiuj, sian tutan vivon, tenas anstataŭ ilon por produkti, armilon por mortigi; de homoj, kiuj forlasis sian volon antaŭ la bontrovo de la superulo? Kiel tiaj estajoj ne kontraŭmetus en ĉiuj aferoj la perforton kontraŭ la prudento? Kontraŭ la inteligenteco kaj la energio kvieta, kiuj laciĝas por fari la estontecon, la militistoj riprezentas do la malspritecon kaj la perforton de la antikvaj tempoj. La armeo estas ĉe ni, kiel sanktejo kie, por malhelpi la civilizantan laboron, por bari la progresadon, la besta forteco estas zorge konservata idealigita kaj plumfaskita, orita kaj galonita. Kaj, de la soldatejo, tiaj kutimoj atingas komunike ĉiujn homojn. La servadaj jaroj estas ĉe ĉiu regnano, lernado de bruteco kaj de malsupreco.

La morala malkuraĝeco, la kutimo de submetiĝo kaj de tremo, jen do tio, kion oni kunportas el la soldatejoj.

Estas elirante el la regimento, ke homoj estas kapablaj iĝi perfiduloj al la klaso laborista fariĝante policistoj aŭ flavaj (1).

Sed la armeo havas alian rolon, ĝi estas tiu je esti la nacia ĝendarmaro.

Estas soldatoj, kiuj estas sendataj ĉe la strikojn, kun

---

(1) Flava : Partiano de la interkonsento de Kapitalo kaj de Laboro; tiu, kiu — partiano de tio, kio ekzistas — rifuzas solidariĝi kun siaj kamaradoj batalantaj kontraŭ la mastreco por la ricevo de iom pli da bonstato. (R. d. l. T.)

pafilo ŝargita, kaj bajoneto ĉe l'pafilo. Estas ili, kiuj sulkas la stratojn per galopadoj kaj atakegoj, kiam, forpelitaj el la laboro de la mastra rabemeco, la laboristoj saĝe opinias, ke ilia loko estas sur la strato.

Kaj ne nur per siaj pafiloj la armeo helpas la Kapitalon. La soldatoj anstataŭas ankaŭ la laboristojn ĉe la strikoj. La nacia armeo, la armeo konsistanta el filoj de l'popolo estas kontraŭ la popolo por servi la mastrojn. La armeo pruntas sian fortecon mortigantan al la mastro kaj ĝi anstataŭas kelkafoje la laboriston ĉe striko.

Hipokrite, la regantoj diras, ke la armeo garantias la liberecon de la laboro. Malvere! Ĝi garantias la triumfon de la ekspluatanto kontraŭ la ekspluatato.

Atendante utili por la milito kontraŭ la fremduloj, la soldato, efektive, utilas ankaŭ kaj utilas precipe por la sociala milito. Regantoj kaj posedantoj neniam ŝancelas antaŭ la uzado de la forteco, kiam ili timas por sia aŭtoritato aŭ por sia mono. La historio de ĉiuj landoj estas tute sange malpurigita de la pruvoj de tiu ĉi verajo. Tuj, kiam la infanoj de l'popolo postulas iom pli da libereco kaj iom pli da bonstato, per pafoj oni al ili respondas. Ne parolante pri la grandaj mortigadoj — kiel tiuj de 1830, 1848, kaj 1871 en Franclando, 1905 en Ruslando, kaj multaj estas la ekzemploj similaj kiujn oni povus citi en ĉiuj landoj de la mondo — kie la proletarioj ruliĝis milope sub la kugloj de la "defendantoj de l'ordo", unu jaro ne pasas sen la esto tie ĉi aŭ tie, de la mortigado de laboristoj.

Ĉiufoje, kiam laboristoj provas por ricevi, per la striko, kelkajn maldikajn profitojn, malgrandan plibonigajon al sia sorto, oni metas la armeon kontraŭ ili. Ĉe ĉiu paso, la strikisto puŝigas kontraŭ la soldato.

Ni estas la proletarioj, t. e. tiuj, kiuj portas hodiaŭ la tutan pezon, la tutan malgajecon de la Socio. La armeo antaŭ ĉio, estas la subteno de tiu-ĉi Socio. Kaj tamen ĝi varbiĝas inter la plej mizeraj, la plej suferantaj pro la kapitalista potenco.

De la tago, kiam la plej bona parto el laboristoj, la konsciaj, volos postuli sian parton da socialaj riĉecoj, de kiuj ili estas produktantoj, bombardilojn, pafilojn, bajonetojn, oni sendos kontraŭ ili.

La filoj kaj la fratoj de la laboristoj fariĝos mortigantoj se ili ne kuraĝos rifuzi la pafadon, rifuzi sian partoprenon al la mortigado.

Jen, kie finiĝas la grandaj paroladoj pri la Patrujo, la ronkantaj frazoj pri la standardo.

Kiam ni laŭdas malspritan ŝovinismon, ni do nur senkulpiĝas, fortiĝas inter la manoj de la ekspluatantoj kaj regantoj, ĉi tiun nevenkeblan fortecon kontraŭ ni.

Se la burĝoj ravas vidante trairadon de militistoj, flago kaj muziko antaŭe, se ili kortuŝiĝas pro ilia bona sintenado, nenio estas pli justa, ĉar tiuj bravaj knaboj gardas la pordojn de la bankoj, de la fabrikejoj, de la laborejoj, de la ministrejoj. Tio estas la sendanĝereco de la monkestoj, la eterneco de la privilegioj kiuj pasas. Kial tiuj, kiuj havas la monkestojn kaj posedas la privilegiojn ne salutus ilin ?

Sed ni, ni kiujn oni kuglaras sur la stratoj pro jes aŭ pro ne ! Rilate al ni, la bataliono, kiu pasas povas esti nur la sklaveco. La sklaveco kaj la honto, ĉar tuj kiam li kovriĝas per la soldata livreo, la viro de l'popolo perfidas, malgraŭ si siajn parencojn. La proletario-soldato, estas la viro de l'popolo dresita por la defendado de la riĉuloj kaj potenculoj, provizita kaj armita kontraŭ siaj fratoj.

La militarismo ekstere de sia celo, havas ankoraŭ alian kaŭzon por esti al ni malaminda. Estas tio, kion ĝi igas el ni ; estas tio, kion ĝi kostas al ni.

La armeo ne estas nur la lernejo de la krimo, ĝi estas ankoraŭ la lernejo de la malvirto, la lernejo de la friponeco, de la mallaboremo, de la hipokriteco kaj de la malkuraĝeco.

Jen kion diras en sia libro *Les Guerres et la Paix* (1), S° Charles Richet, profesoro en la Pariza universitato : « Ĉe la regimento, la soldato perdas la kutimon al la laboro. La laboristoj de la kampoj aŭ de la urboj, kiuj estis devigataj gajni tre malfacile, sian ĉiutagan panon, opinias, ke la soldatejo estas rilata ripozo.

« Rilate al la kamparano, se la laboro ne estas laciga, ĝi estas netolerebla ; ĉar li ne komprenas ĝian utilecon, dum li tre bone scias, kial li devas sarki sian kampon aŭ konduki sian plugilon. Je ĉiuj okazoj, ne prenante guston per la militista metio, li perdas sian tutan fervoron por la kamparana metio. Li ĝoje lasas la armeon, ĉar la armeo estas sklaveco, sed li ĝin lasas malĉastigita, li tediĝas por la terlaboro, li eksciis vagi, nenion fari dum longaj horoj, kaj promeni sur la stratoj. »

---

(1) La militoj kaj la Paco.

« La Alkoholismo, la protitado kaj la hipokriteco, jen tio, kion instruas la vivo ĉe la soldatejo ».

Renan diris ankaŭ, ke se li estus estinta soldato, li estus forlasinta.

Markizo de Rochefort, Franca publikigisto, en Februaro 1871, skribis parolante pri la Preŭsoj.

.....: » Ili rabis niajn farmdomojn, krevis niajn tegmentajojn, ili ŝtelis ĉion, mortpafis ĉiujn, malrespektis ĉion; nu! apenaŭ tiuj mortigantoj kaj tiuj rabistoj faris la duonon de la krimoj kiujn faris la Francaj militistaroj. « Kaj li skribis ankoraŭ : » Niaj venkintoj ne estas pli kruelaj kontraŭ ni ol ni estis kruelegaj kontraŭ niaj venkitoj «

Estas bone, ke oni sciu tion, kio diris pri la soldatejo en momentoj, kiam ili pripensis iom, la kontraŭbatalantoj patriotaj kaj pastranaj de la nunaj tagoj :

S° Edouard Drumont, direktoro de la Franca katolika ĵurnalo » *La Libre Parole* «, diris : Ĉu vi scias ion pli malĝojigantan ol la ekzisto de tiu malfeliĉulo, kiun oni formetas el sia kampo, el sia vilaĝo, kaj kiun oni ĵetas dum kelkaj jaroj en soldatejon malproksime de siaj gepatroj, de siaj gefratoj, de siaj amikoj, malproksime de ĉio, kion li amas, kondamnita vivi kun aliaj viroj tiel kompatindaj kiel li ?

» Kion vi volas, ke restu al lando da fortikeco rizervita, kiam post dudek jaroj, ĉiuj viroj estos pasintaj tra tiu terura fadeningo ?

» Ĉiuj tiuj filoj de la tero, kiuj estus edziĝintaj je brava filino kaj estus naskigintaj fortikajn knabojn revenas hejmen pli-malpli sifiliizitaj, malĉastigitaj de la malpuraj amoj de la fortikajoj, perdinte la respekton, por la virino, dekutimigitaj por ĉiu laboro de mekaniko, laciĝataj kaj malplenaj. Ili estas generacioj finitaj «.

Markizo de Rochefort skribis :

» La estroj, tiuj ekzekutistoj malspritaj, miras pro la nombro ĉiam kreskanta da forlasadoj !

« Nu ! oni preferas vivi mizere alilande, ol pro gesto, iuj similigata je fakto, iĝi sin buĉi en la malliberejoj Tunisa kaj Konstantina. « (*Intransigeant*, 19an septembro 1895.)

Aliloke, s° de Rochefort diris :

» Kombino favora malhelpis ke mi eniru en tiun belan Francan armeon, kie mi ne estus, eble doninta alian ekzemplon ol tiu de la forlasado. «

S° de Freycinet, trifoje ministro de la militaj aferoj, diris :

» Hodiaŭ, la vivo de la soldato plimalgrandigas ilian moralan valoron anstataŭ ĝin pligrandigi. Detenata dum multaj jaroj ĉe la regimento, uzanta por tedaj laboroj kvar aŭ kvin fojojn la tempon, kiu estus necesa, okupata nur por materialaj zorgoj, li pasigas grandan parton el siaj tagoj en la senokupo, la spiriton malfermata por ĉiuj okazoj de diboĉo, kiun prezentas la gastado en la grandaj urboj.

« Li vizitadas la drinkejon, li ekkonas malbonulojn... Enirinte ĉe la regimenton malklera kaj honesta, li eliras tro ofte tiel malklera sed putrigita. »

« Feliĉe ankoraŭ, kiam li ne kunportas mallaboremajn gustojn, kiuj malebligos, ke li gajnu honorinde sian vivon. »

S° Jules Delafosse, Franca deputato, konservativulo, diris pri la militservado :

« Jam delonge la filozofoj, la ekonomiistoj, la moralistoj, la sociologiistoj, la industriestroj kaj la lernejestroj, ĉiuj homoj, kiuj laboras, kaj ĉiuj homoj, kiuj pensas, ĉiuj tiuj, kiuj ne politikas kaj konservas; pro tio, la liberan kaj sanan spiriton, konigis la socialajn efikojn de la militservado. Ili estas terureĝaj.

« Ĝi malkutimigas la laboriston de la kampoj, kiel la laboriston de la industrio, pri la manlaboro kaj malhelpas aŭ malrektigas tiel ilian sorton.

Iniciatante ilin pri la urbaj plezuroj, ĝi vekas ĉe ili apetitojn kaj malvirtojn ne konatajn. Anstataŭ savan leĝon de la laboro, ĝi enigas malrapide en ilian nesingardeman kaj naivan animon la putrigantajn inspiradojn de la mallaboremo. Ĝi igas, ke ili kompatas la familian hejmon kaj malestimas la profesian ilon. El laborema knabo, simpla kaj senartifika ĝi faras egoistan ĝuanton konstante serĉantan oficon.

» Samtempe, kiam ĝi ilin malproksimigas de la laboro, ĝi ankaŭ malproksimigas ilin de la edziĝo kaj dediĉas la plej bonan parton el nia juneco al la senfrukteco. Ni fariĝas popolo, al kiu, ĉia ofico tedegas, kaj kiam la eksterlanda konkurenco nin minacas kaj jam nin enpenetras ni laboras malplej !...

» Tiu tuta malordo estas la laboro de la militservado k. t. p.... »

S° François Coppée, el la Franca akademio, prezidanto de la » Ligue de la Patrie Française « (1) skribis en » Le

---

(1) Ligo de la Franca Patrujo.

Journal « : » Ĉiu ne havas la militistan emon, kaj la militservado dum la paco, senkuraĝiganta kaj maldelikata, ofendas la delikatulojn. Al la diablo la Korporalismo ! (1) Tiu studento, tiu juna artisto, incitiĝas pro esti interrompataj ĉe siaj laboroj, en plena juneco, kaj tiu revanto malesperas vidi repuŝata ĝis la fundo de duba estonteco sian noblan ĥimeron de patra kaj pacigita mondo «.

Jezuito R. P. Forbes, ekkrias predikante : » La familioj donas al la armeo junulojn purajn kaj sanajn, ĝi al ili redonas virojn putritajn ĝis la spino havantajn hontindajn malsanojn kaj difektantajn malvirtojn.... «

Kaj aliloke :

La kutimoj de diboĉo estas tre disvastigitaj en la armeo inter la soldatoj, jen pri kio sciiĝas min nekalkuleblaj leteroj de spiritaj infanoj al mi, kiuj pasigis en la soldatejo » tempon de teruro, kies la sola memoro starigas la harojn sur ilia kapo. «

Abato Crestey, diris :

Ĉu oni povas imagi civilizacion, kiu fieriĝas, kaj kiu liveras al la diboĉo ĉiujn regnanojn devigatajn pasi tra tiu loko de morala infekto, kiun oni nomas » Soldatejo « ?

Jen kion skribis Maurice Spronck el la » Ligue de la Patrie Française « Pariza deputato :

» Kiam la militarismo pleniĝis la mezuron per ridindaĵoj, hontoj kaj teruroj, kiujn implikas ĝia esenco mem, ĝi neiĝis, ĉe la unuanimaj aplaŭdadoj de ĉiuj popoloj. «

Aliaj verkistoj ankaŭ diris :

» La militistaroj regulaj estas kreitaj ŝajne por defendiĝi kontraŭ alilando, efektive por subpremi la loĝanton. «

J.-J. Rousseau.

» La militistaroj regulaj estis kaj estos ĉiam la granda malfeliĉego de la libereco. «

Mirabeau.

» La leĝoj produktas la militojn, kaj la militoj formetas parton da loĝantoj de la mondo. «

Linguet.

---

(1) Politika regado, en kiu la militistoj havas la ĉefan influon.
R. d. l. T.

Vilhelmo la 2ª kuraĝis diri al siaj soldatoj :

« ... Nun vi estas miaj, kaj, se mi devus, sekve de la socialistaj kondukadoj, ordoni al vi, ke vi mortpafu viajn fratojn, viajn patrojn, viajn patrinojn, vi devos obei al mi... »

Fine Markizo de Rochefort prave skribis tiun ĉi verajon :

« Oni elektas la militistan profesion nur en la espero, ke oni mortigos homojn, kaj, kiam oni estas sufiĉe forta por mortigi tiujn de la aliaj nacioj, oni ekstermas la siajn. — *Intransigeant*, 1894-96. »

Kaj la plej bona pruvo de tio estas, kion skribis al amiko la leŭtenanto mortigisto Anastay revenante de milita mobilizado kontraŭ la elmontrantoj de la 1an de Majo en Lyon dum 1891 : Mi estas lacega. Ni dejoris la tutan tagon, ĉar oni atendis ribelon de la revoluciuloj. Mi certigas vin, ke, se tiuj porkoj-socialistoj estus ekbruetintaj, kare ni estus igintaj ilin pagi tiun ĉi lacecon. »

Ankaŭ, Anatole France, el la Franca akademio, prave skribis : « La armeo estas la lernejo de la krimo. »

Pli teruraj ol ĉio, estas la faroj de la militarismo en la kolonioj.

Sro Paul Vigné d'Octon, Franca deputato, antikva oficiro de ŝiparo, konigis ĉe la tribuno de la parlamento faktojn, farojn de kruelado sensimila, elfaritajn izole kaj multope, de la soldatoj kaj de iliaj estroj. La heroaĵoj de ĉiuj tiuj malbonuloj estas rakontitaj al la riprezentantoj de la nacio, kiuj nur promesis enketon.

Krom la rakontoj de Vigné d'Octon, kuraĝaj homoj precizigis en volumoj aŭ revuoj tion, kion ili vidis dum sia trairo tra la soldatejo.

Ni nur diru al la junaj soldatoj tion, kio atendas ilin se, enirante en la soldatejon, ili forgesas lasi ekster la pordo sian moralan indecon.

Jen tre mallonge kaj tre resume denombritaj, kiaj estas la procedetoj de turmentego, kiujn oni uzas por la "malbonaj kapoj". Jen eĉ tio, kio atendas la malfeliĉulon, kiu estos suferinta antaŭ sia eksoldatiĝo unu malgravan kondamnon, kiu lin sendas al la punaj regimentoj :

Estas unue la « **Pucetoj** » instrumento por turmentego inda je Torkuemada, kiun per skribaĵoj aŭ paroladoj montraj konigis al la publiko la antikva disciplinulo kulpa je revoluciaj opinioj. Dubois-Dessaule, kaj kiun la ministro de la militaj Aferoj promesis neniigi.

La « **buŝbarilo** »: tio estas jen pikilo por tendo metita

laŭlarĝe de la buŝo kaj fiksita solide per naztuko; jen dika ŝtono alligita same. Feliĉe estas se tiu ĉi ŝtono ne estas antaŭe malpurigita per ekskrementoj!

La » **Krapodino** «: per serio da ligiloj, piedoj kaj manoj estas kunligitaj ĉe la dorso, devigantaj tiel la korpon formi arkon. Por igi pli sufera la turmenton, ofte, la ŝnuroj estas malsekigitaj, por ke ili penetru pli bone en la karnojn.

Ne estas malofte, ke al la malfeliĉulo turmentata kiu petas trinkajon oni alportas teleregon da treege salita fluidaĵo.

Pri la telerego da buljono, kiun la malfeliĉulo devas trinki kiel li povas, la adjudanto dejora zorgas certiĝi per la ekstremaĵo de sia bastono, ke la kuiristo ne metis pecon da viando.

En Kef, en Tunislando, kapitano de la 5ª roto, metis ŝablon anstataŭ panon en tiun buljonon.

La » **ĉambreto de korektado** «; la soldato tute nuda estas jetita en ĉambreton, — li estas » civile vestita « — kaj li ricevas, kiel nutraĵon, nur buljonon ĉiudutaĝe.

La » **baro** « aŭ la » **katenoj** « : la viro, preskaŭ ĉiam nuda aŭ proksimume, havas la krurojn kaptitajn per du ringoj, kiuj glitas ĉirkaŭ longa ferbaro, konstruita por trapiki dekduon da suferantoj.

Jam okazis, ke dum vintro la tero kovrita de unu metro da neĝo, tri viroj estis » ĉe la katenoj «.

Pro la temperaturo, la dejora korporalo devis certiĝi pri ilia stato ĉiuhore; li forgesis la instrukcion! Rezultato: la tri viroj havis la piedojn frostiĝintaj, ili ne estis deklaritaj malsanaj kvankam tio, kaj oni nur finis ilian turmenton.

La » **tombo** «; unu tendo, tre malalta, triangula, alta jekvardek centimetrojn de la fundo ĝis la supro; la suferanto kuŝas sur la ventro, la mentonon sur ŝtono, la manojn ĉe la dorso, — kaj ĉiam ligatajn! La tolo estante tro mallonga, la kapo kaj la piedoj estas, tage elmetitaj al la bruligado de la suno, nokte al la malvarmo.

La » **roto de ĉaso** « : la viroj punataj, piedvestitaj de ŝuegoj sen gamaŝoj, kelkafoje nudpiedaj, sakon ĉe la dorso, la regula pezo estante reprezentita per sablo aŭ ŝtonoj, estas submetataj je ekzerco, kiun la fantazio de la estro ŝanĝas por kreskigi la suferon de la malfeliĉuloj; jen li

ordonas al ili la senmovecon en laciga kaj dolora sido; jen li ordonas al ili la paŝadon gimnastikan aŭ la paŝadon akcelan, zorgante elekti vojon, ŝtonplenan.

Kiam la turmentatoj efektivigas malbone liajn ordonojn, la serĝento furioza, ilin pligrandigas; tiel li komandas al ili la paŝadon gimnastikan kaj, sciigas ilin, ke li elparolos la vorton » haltu! « nur, kiam lia pipo estingiĝos. Kiam la kompatinduloj iom ripozas, por ilin » refreŝigi «, li metas ilin, laŭ sia esprimo, » la faŭko ĉe la vento «, en plena trablovego.

K. t. p., K. t. p.

Jen, kio estas la armeo. Oni eliras el ĝi tedita aŭ bestigita. Du aŭ tri jaroj pasigitaj en soldatejo faras el viro konscian ribelanton aŭ pasivan bruton.

Jen nun kiom kostas la armeo:

Oni ne trovas monon por asekuri pension al la laboristoj, kiuj produktis sian tutan vivon, sed oni ĝin trovas por tiuj, kiuj faras metion de soldato, nekonante la malnoblecon, kiu estas la soldatejo por la soldato, ĉar ili estas oficiroj.

En Franclando, jara salajro:

Komandanto 5.508 frankojn

Leŭtenanto-kolonelo 6.588 frankojn

Kolonelo (soldo kaj elspezo por servado) 15.930 frankojn;

Generalo de korpusero (soldo kaj elspezo por servado) 26.874 frankojn;

Komandanto de korpuso, 30.240 frankojn;

Membro de supera konsilantaro de la milito 38.858 frankojn.

Milita guberniestro de Parizo 44.442 frankojn.

Ne parolante pri la profitoj efektivigitaj de la kolonia rabado, la ekzacioj, la ŝtelo, la donacoj, kiuj igas sin senti de alte ĝis malalte de la hierarkio, kaj kies ekzemplaj-modeloj pleniĝis la raportojn Cavaignac kaj Pelletan; kvindek juĝoj de militaj juĝejoj, miloj da raportoj de kontrolo, kaj pli ankoraŭ da aferoj ĉesigitaj.

Kaj la kompensajoj al ĉiuj tiuj bravaj oficiroj, trenantaj glavojn? Unu sola ĉapitro de la budĝeto superis *11 milionojn* da frankoj. Ĉio tio dum la paco!

Tiuj homoj parolas al la soldatoj pri malprofitemo, sed ili ricevas ĉiam monon. Ili ĝin ricevas por ne batali; ili ĝin ricevas por batali; ili ĝin ricevas se ili revenas, kaj ili revenas, ĉar ili ne elmetiĝas tro kaj estas flegataj. Ili havas sepfoje malpli da riskoj por morti ol la soldato. Oni povas,

netrogandiĝante, taksi je pli ol **1 miliardo** la budĝetojn jarajn por la tera kaj mara armeoj.

Nu, ni sonĝu pri tio, kion farus la disdonado de unu miliardo, jare! Ni sonĝu pri la bonstato, kiun donus por ĉiu familio la jara sumo da 150 frankoj. La miliardo, kiun kostas al ni la armeo, estas kapitalo je 5.000 frankoj, proksimume por ĉiu Franca familio. Do, se oni eligus la armeon, oni povus, per ĝia budĝeto, doni 5.000 frankojn al ĉiu familio en Franclando, diras Sº Charles Richet.

Nuntempe Eŭropo havas budĝeton militan da pli ol **10 miliardoj** da frankoj.

En 1899, ĝi havis nur:

**7,184,321,093 frankojn.**

Ĝi okupis:

**4,169,321 homojn.**

kiuj, se ili laborus, produktus (taksante la produkton je 3 frankoj ĉiutage kaj ĉiuhome)

**12,507,963 frankojn.**

Eŭropo armata, uzas,

**710,342 ĉevalojn.**

(kiuj produktus laborante mezan kvanton minimuman da 2 frankoj ĉiutage kaj ĉiuĉevale), kio farus:

**1,420,684 frankojn.**

aldonitajn al la 12.507.963 frankoj, tio faras:

**13,928,647 frankojn.**

Tiu ĉi nombro, multiplikita per jaro nur da 300 tagoj, tio faras:

**11 miliardojn**
**362 milionojn**
**915,913 frankojn**

kalkulante la budĝeton.

Ĉiujn jarojn, tiu nombro pligrandiĝas.

Kaj ĉio tio por malhelpi la militon, oni diras, aŭ por ĝin prepari.

**En Franclando, la nuntempa budĝeto estas da:**

**1,101,260,000 frankoj.**

Jen la prezo de la paco kun armado!

Jen kiom kostas la armeo!

Ĉu tio ne estas abomena?

Tamen io estas pli terura; tio estas la milito.

III

# LA MILITO

Jus malaperis en Franclando fama kaj konscienca verkisto, (Emile Zola) kiu lasis al ni en bela libro » La Débâcle « kelkajn realajn priskribojn pri la milito.

Por tiu ĉapitro, ni opinias, ke estas pli bone ke ni lasu larĝan lokon por la ciferoj kaj por tio, kion povis diri pri la milito la pensuloj ĉiutempaj ĉiulandaj kaj ĉiuopiniaj.

## LA BATALKAMPO

Priskribaĵo eltirita el la » La Débâcle « de Emile Zola.

. . . Tiun fojon, estis la vera batalkampo, la nudaj kampoj, kiuj sterniĝas ĝis la horizonto, sub la granda ĉielo pala, de kie disfluas senĉesaj pluvegoj. La mortintoj ne estis amasigataj tie, ĉiuj Preŭsoj jam devis esti entombigitaj, ĉar restis neniu, inter la kadavroj disaj de la Francoj, semitaj sur la vojoj, en la pajlaĵoj, ĉe la fundo de la kavaĵoj, laŭ la hazardoj de la batalado. Kontraŭ branĉobarilo, la unua, kiun ili renkontis estas serĝento, belega, juna kaj forta viro, kiu ŝajnas rideti per siaj malfermitaj lipoj ; la kvieta vizaĝo ! Sed, cent paŝoj pli malproksime, laŭlarĝe de la vojo, ili vidis alian, malbelege vunditan, la kapon duone detranĉitan, la ŝultrojn kovritajn de la ŝprucigoj de la cerbo. Post la izolitaj korpoj, tie ĉi kaj tie kuŝis malgrandaj grupoj ; ili ekvidis sep, unu post alia, la genuon en tero, la armilon ĉe la ŝultro, frapitaj, kiam ili pafas ; dume, apud ili, suboficiro estis falinta ankaŭ, en la sintenado de komando. La vojo poste kuŝis laŭ la longo de mallarĝa valo, kaj tie la teruro ilin rekaptis, kontraŭ tiu ĉi speco de fosaĵo, kie tuta roto ŝajnis esti renversita, sub la kuglaro ; kadavroj ĝin plenigis, malstarigo, defalado de viroj, ĉirkaŭkaptitaj, rompitaj, kies torditaj manoj estis defrotintaj la flavan teron, ne povante sin deteni. Kaj nigra flugado de korvoj forflugis per kroasadoj ; kaj jam muŝaroj zumis super korpoj, revenis milope kun obstineco por trinki la freŝan sangon el la vundoj. . . .

. . . . . Estis terure ; la tero elrenversita kiel per tertremo,

derompajoj trenantaj ĉie, mortoj renversitaj intermiksite, en kruelegaj sintenadoj, la brakojn tordintajn, la krurojn faldintajn, la kapon dejetitan, krigantaj per sia buŝo kun blankaj dentoj, tre malfermita.

Brigadio estis mortinta, la manojn sur la palpebroj, en timigita kuntirado, kiel por ne vidi. Oraj moneroj, kiujn leŭtenanto portis en zono, estis fluintaj kun lia sango, dissutitaj inter liaj internaĵoj. Unu sur alia, la geedzoj Adolfo la kondukisto kaj la celisto Ludoviko, la okulojn eliritajn el la okulejoj, restis sovaĝe kisantaj, edziĝintaj ĝis en la morto. Kaj estis fine Honoreo, kuŝita sur sia lama bombardilo, kiel sur honora lito, fulmofrapita ĉe la flanko kaj ĉe la ŝultro, la vizaĝon sendifektan kaj belan pro kolero, rigardantan ĉiam, tien, al la Preŭsaj baterioj.

* * *

La homoj kiuj estas konsiderataj la plej famaj inter siaj similaj estas ĝuste tiuj, kiuj mortigis plej multe da homoj.

Aleksandro la Granda pereigis du milionojn da homoj.

Napoleono la 1a la Granda, faris ok milionojn da suferantoj, tri milionojn da Francoj kaj kvin milionojn da alilanduloj.

La militoj la plej konataj de 1799 ĝis nun faris pli da **dekkvin milionoj** da suferantoj, kiuj dismetiĝas kiel sube:

| | |
|---|---|
| Militoj de Napoleono (1799-1815 | 8.000.000 |
| — de Ruslando (1854) | 800.000 |
| — de Itallando | 300.000 |
| — de Preŭslando | 300.000 |
| — Amerika (sklavema-kontraŭsklavema) | 500.000 |
| — Franca-Germana (1870) | 800.000 |
| — Turka-Rusa | 400.000 |
| — Rusa-Japana (1904-1905) | 400.000 |
| Civilaj militoj en Suda Ameriko | 500.000 |
| Koloniaj militoj (Hindlando, Meksilando, Alĝerio, Abisinlando, Transvaalo, Javao, Madagaskaro | 3.000.000 |
| Kune | 15.000.000 |

Certe, ekonomia batalado faras ankaŭ suferantojn sed ĝi estas malpli rekte dependanta de nia volo.

* * *

Komprenéble, la sumoj necesaj por la milito estas ankoraŭ pli neordinaraj ol tiuj, kiujn postulas la paco kun armado (1).

La salajroj de la estroj treege pligrandiĝas tempe de milito aŭ de militiro.

Laŭ Sº de Foville, la milito Franca-Germana de 1870 kostis, pli ol 30 miliardojn da frankoj.

* * *

Multe da homoj pli-malpli bone intencantaj parolis por la paco. Kongresoj por la paco okazis. Du funebraj personoj hipokrite montris sin partianoj: La Papo kaj la Imperiestro de Ruslando.

Tiu lasta eĉ estis, por tiel diri, la iniciatoro de movado en sia favoro.

Sed en la sama momento li pliigis sian armeon, multigis siajn militŝipojn kaj siajn torpedboatojn, tiraniis la venkitojn de Finlando kaj de Pollando turmentegis la laboristojn kaj la studentojn ribelantajn kontraŭ liaj kruelaĵoj.

Ĉe la momento mem, kiam tiu malbonulo kruela kaj idiota, parolis por paco, liaj soldatoj en Finlando mirinde kunligis per iliaj harligoj la kvietajn loĝantojn de tiu lando, kiu eljetas la militon.

Homoj tiel kunligitaj estis puŝataj per batoj de kapo de l'pafilo kaj de glavo en la ondojn de la riverego » Amur « kie ili estas trovitaj formantaj milojn da malvivuloj, kapablaj alkonduki peston, kiu estus triobliginta tiun ĉi mortigadon faritan de la soldatoj de la paĉjo, Nikolao la IIª.

Ĉe la momento, kiam ĉiuj tiuj malveraj apostoloj parolis pri paco, pri juĝejo por arbitracio inter la nacioj, la Angloj premegis la Burojn (2) per la nombro de siaj volontuloj kaj la perfektigo de sia kartoĉo » dum-dum «.

---

(1) Kosto de la Rusa-Japana milito. — Pri tio ni nur havas nesufiĉajn sciigojn. La taksadoj ŝanĝas, de 5 ĝis 6 miliardoj da frankoj, por Rusujo, kaj de 3 ĝis 4 miliardoj por Japanujo. Tre verŝajne, la veraj kostoj estas pli grandaj. Rusujo prunteprenis 1.475 milionojn da frankoj; kaj Japanujo pruntepetis 2.500 milionojn en bankoj de Londono, de Nov-Jorko, kaj ni ne parolas pri la enlandaj pruntepetadoj.

El « Espero Pacifista » Nº 8ª.

(2) Loĝantoj de la Sud-Afrika Respubliko.

Nur la laboristoj povas trudi la pacon. Ili rifuzu faciligi la elŝarĝadon aŭ la ŝarĝadon de la komercaĵoj necesaj por la milito.

Ili rifuzu fabriki tiujn komercaĵojn kaj ili rifuzu fine ilin uzi ; ilia interkonsento loĝiĝu internacie.

## LA PATRUJO, LA ARMEO, LA MILITO

juĝitaj tra la tempoj.

La filozofoj kiaj ajn, pensis ĉiam pri milito kiel pri malbono : Cicerono, Seneko kaj imperiestro Mark-Orelo mem ĝin kondamnis kiel maljustan kaj absurdan. La pensuloj, de Pascal kaj Leibnitz ĝis Kant, Tolstoj kaj pastro Graty ne ĉesis ĝin proklami maljusta kaj absurda. La verkistoj satiraj kaj la poetoj, de la Bruyère kaj Voltaire ĝis Henri Heine, Victor Hugo kaj Lamartine, ĝin sciigis maljusta kaj absurda.

* * *

Sola mortigo faras krimulon, miloj da mortigoj faras heroon.

Erasme.

La homa speco daŭros ĉiam, la Patrujo devas fini.

Diderot.

Estas virto supera ol tiu de la Patrujo, kaj tiu ĉi virto estas la amo al la homaro.

Mably.

Kiam la libereco estas malaperinta, plu ne estas Patrujo.

Chateaubriand.

La nacioj estas difinitaj por kuniĝi por fari nur unu grandan, kiu dissaltigos la landlimojn.

Chevreul.

Jes, socio kiu akceptas la mizeron; jes homaro, kiu akceptas la militon, ŝajnas al mi socio, homaro malsuperaj; estas al la socio supra, al la homaro supra kien mi celas, socio sen reĝoj, homaro sen landlimoj.

Victor Hugo.

La Amo al la Patrujo estas mistifiko.

Alphonse Karr.

En la jaro 2.000 estos plu nek militoj nek landlimoj surverŝitaj de homa sango.

Berthelot.

*
* *

Oni punas la mortigojn, kiujn la privatuloj faras. Kaj kion oni diros pri la militoj, kaj pri tiuj mortigadoj, kiujn ni nomas gloraj, ĉar ili detruas tutajn naciojn? La amo al la almilitoj estas frenezeco: la almilitantoj estas malfeliĉegoj pli pereigaj por la homaro ol la superakvegoj kaj la tertremoj. Aleksandro, rabisto de la infaneco, detruanto de la nacioj, pensis ke estas bone por regnestro, esti la teruro de l'homoj.

Seneko.

*
* *

Estas do tie via vojo al la senmorteco! Detrui la urbojn, ruinigi, la teritoriojn, ekstermi la popolojn liberajn aŭ ilin sklavigi. Ju pli ili estas ruinigintaj, rabadintaj, mortigintaj homojn des pli ili kredas sin noblaj kaj gloraj; ili ornamas siajn krimojn per la nomo virto. Tiu, kiu donas la morton al unu sola persono estas vekigata kiel krimulo... Sed elmortigu milojn da homoj, superakvu la teron per sango, infektu la riverojn per kadavroj, oni donas al vi lokon en Olimpo.

Lactance.

Verkisto Latina, alnomita la « Cicerono kristano » ĉirkaŭ la jaro 300<sup>a</sup> de nia tempokalkulo.

*
* *

Pri la milito, kiu estas la scienco por nin intermalfari kaj intermortigi, por ruinigi kaj perdi nian propran specon, ŝajnas, ke ĝi ne igas sin deziri de la bestoj, kiuj ĝin ne havas.

MONTAIGNE.

*
* *

Tiel, unu sola homo, donita al la mondo per la kolero de la dioj, oferas brute tiom da aliaj por sia vanteco! Estas necese, ke ĉio pereu, ke ĉio naĝu en la sango, ke ĉio estu konsumata de la flamoj, ke ĉio tio, kio foriras el la fero kaj el la fajro ne povu foriri el la malsato, ankoraŭ pli kruela, por ke, tiu homo, kiu mokas la homan naturon tutan, trovu en tiu ĝenerala detruado sian plezuron kaj sian gloron. Kia monstra gloro! Ĉu oni povas tro malami kaj tro malestimi homojn, kiuj tiel forgesis la homaron? Ne, ne! tre malproksimaj de la duonaj dioj, ili ne estas eĉ homoj.

FÉNELON.

Okazis post la superakvego, kiam tiuj ruinigistoj de provincoj, kiujn oni nomis almilitantoj, puŝataj de la sola gloro de l'komando ekstermis tiom da senkulpuloj.... De tiu tempo, la ambicio mokis, senlime la vivon de l'homoj; ili eĉ intermortigadis sin ne malamante unu la alian. La lasta grado de la gloro kaj la plej bela el la agoj estis mortigi unuj la aliajn.

BOSSUET.

*
* *

Mi dezirus vidi la militemulojn
Sur la batalkampo, je la horo, kiam
Pecigas la korvoj ĉi tiujn okulojn
Kaj ĉi tiujn korojn, kiuj amis iam.

Dum sur ebenaĵo, kiuj kuŝas inter
Krispiĝintaj fingrojn, malfermita buŝon
Ĉiujn rigardante, ili vidas sur ter'
Unu sian fraton, alia infanon.

Ho! mi volus vidi la militemulojn
Kiam bombardiloj sur la batalantojn
Kraĉegas multegajn amasojn kuglarajn;

Je l'krepusko vidi tiujn homojn ĉiujn
Antaŭ tiuj fruntoj boritaj, en kiujn
Vizitis la morto virojn dudek-jarajn.

Fi-Blan-Go, laŭ Ronsard.

*
* *

La milito kunigas ĉion, kion la perfideco havas plej malkuraĝan en la manifestoj, ĉion, kion la malglora friponeco havas plej malaltan en la liveraĵoj al la armeoj, ĉion, kion la rabado havas plej malbelegan en la ŝtelo, la malrespekto, la ruinigado, la detruado.

La rajto por la paco, mi ĝin konas sufiĉe: ĝi estas plenumi siajn promesojn, kaj lasi ĉiujn homojn ĝuî la rajtojn de la naturo; sed rilate al la rajto por la milito, mi ne scias tion, kio ĝi estas. La leĝaro de la mortigo ŝajnas al mi stranga imago. Mi esperas, ke baldaŭ oni donos al ni la juĝan kutimon de la grandaj ŝtelistoj. Voltaire.

La milito, tio estas la mortigo; la milito, tio estas la ŝtelo. Tio estas la mortigo, tio estas la ŝtelo, instruataj kaj ordonataj al la popoloj de iliaj registaroj. Tio estas la mortigo, tio estas la ŝtelo, aprobataj, blazonataj, indigataj, kronataj.

Tio estas la mortigo, tio estas la ŝtelo, krom la puno kaj la honto, plie la malpuno kaj la gloro.

Tio estas la mortigo, tio estas la ŝtelo, elprenataj el la eŝafodo de la triumfarko.

Tio estas la leĝa nekonsekvenco, ĉar tio estas la socio ordonanta tion, kion ĝi malpermesas, kaj malpermesanta tion, kion ĝi ordonas; rekompencanta tion, kion ĝi punas, kaj punanta tion, kion ĝi rekompencas; gloranta tion, kion ĝi malhonoras kaj malhonoranta tion, kion ĝi gloras: la fakto estante sama, la nomo sola estante malsama.

Emile de Girardin.

*
* *

Se io estas terura, se ekzistas realeco, kiu superas la songon, jen estas tio: Vivi, vidi la sunon, posedi la plenan viran fortecon, esti sana kaj ĝoja, ridi kuraĝe, kuri al gloro, kiun oni havas antaŭ si blindiganta, senti en sia brusto pulmon, kiu spiras, koron, kiu moviĝas, volon, kiu pripen-

sas, paroli, pensi, esperi, ami, havi patrinon, fratinojn, havi infanojn, kaj subite post ekkrio post malpli ol unu minuto fali en profundegajon, ruliĝi, premegi, esti premegata, vidi grenspikojn, florojn, foliojn, brancojn, povi ŝirmiĝi per nenio, senti sian glavon neŭtila, senti homojn sub si, senti ĉevalojn sur si, barakti vane, la ostojn rompitajn de ia ĉevalpiedbato en la mallumego, senti kalkalumon, kiu ŝprucigas siajn okulojn, mordi furioze hufferajojn, sufokiĝi, kriegi, tordiĝi, esti sub tio, kaj pensi : « Jus, mi estis vivulo ! »

Victor Hugo.

* * *

Kiam mi pripensas nur pri tiu vorto, milito, ŝajnas al mi, ke oni parolas pri sorĉarto, pri inkvizicio, pri afero malproksima, finita, abomena, monstra, kontraŭnatura.

Kiam oni parolas pri hommanĝantoj, ni malhumile ridetas, proklamante nian superecon pri tiuj sovaĝuloj.

La sovaĝuloj, la veraj sovaĝuloj, kiuj estas ? Tiuj, kiuj sin batas reciproke por manĝi la venkitojn, aŭ tiuj, kiuj sin batas por mortigi, nur por mortigi ?

La soldatetoj, kiuj tie kuras, estas difinitaj por la morto, kiel brutaro, kiun puŝas buĉisto sur la vojoj. Ili iros por fali sur ebenaĵo, la kapon fendita per glavo aŭ la bruston traborita per kuglo ; kaj ili estas junuloj, kiuj povus labori krei, utili. Iliaj patroj estas maljunaj kaj malriĉaj ; iliaj patrinoj, kiuj dum dudek jaroj, estas ilin amintaj, amegintaj, kiel amegas patrinoj, ekscios post ses monatoj, aŭ eble unu jaro, ke la filo, la infano, la granda infano edukita per tiom da penado per tiom da amo, estas ĵetita en truon, kiel malviva hundo, post kiam oni lin trapikis per kuglego kaj la kavaleriaj atakegoj lin dispremis. Kial oni mortigis sian knabon, sian belan knabon, sian humilecon, sian vivon ? ŝi ne scias, Jes, kial ?

La milito !... batali !... Tranĉi la gorĝon !... Buĉi homojn !... Kaj hodiaŭ ni havas, kun nia civilizacio, kun la amplekso de la scienco kaj la grado de filozofio, kie oni kredas, ke la homo sukcesis, lernejojn, kie oni ekscias mortigi, mortigi de malproksimege, perfekte, multajn samtempe, mortigi malfeliĉajn senkulpulojn, familiajn patrojn.

Kaj la plej miregante estas, ke la popolo ne staru kontraŭ la registaroj ; la plej miregante estas, ke la homaro tuta ne ribelu kontraŭ ĉi tiu sola vorto : milito !

Guy de Maupassant.

Mi kredas nevenkeble, ke la Scienco kaj la Paco triumfos de la nescio kaj de la milito, ke la popoloj interkonsentos ne por detrui sed por konstrui, kaj ke la estonteco apartenos al tiuj, kiuj estos la plej farintaj por la suferanta homaro.

PASTEUR.

La malsato instruis la barbarojn pri la mortigo, puŝis ilin al la militoj, al la ekokupoj. La popoloj civilizitaj estas kiel la ĉashundoj. Instinkto putrigata ekscitas ilin por detrui sen profito nek praveco. La nepraveco de la modernaj militoj nomiĝas dinastia intereso, nacieco, Eŭropa ekvilibro, honoro. Tiu lasta motivo estas eble el ĉiuj la plej malsaĝa, ĉar ne estas popolo en la mondo, kiu ne estu malpurigita per ĉiuj krimoj, kaj kovrita per ĉiuj hontoj. Ne estas unu, kiu ne estu suferinta ĉiujn humiligaĵojn, kiujn la riĉeco povas fari al mizera bando da homoj. Se tamen ekzistas ankoraŭ honoro ĉe la popoloj, fari la militon, estas stranga rimedo por ĝin subteni, ĉar tio estas fari ĉiujn krimojn per kiuj privatulo sin malhonoras: bruligado ŝtelado, malrespektado, mortigado.

Anatole FRANCE.

Oni vidas ĉiutage gravajn personojn, havantajn la ŝajnon kaj la famon de saĝaj homoj, deklami per majstra tono, ke la kvar plej famaj homoj de l'tero estis Aleksandro, Anibalo, Cezaro kaj Napoleono. Kiel! en nia centjaro, meze de kleraj homoj, oni povas elparoli, ne ekscitante la ridon, tiel malnovajn naivegaĵojn! Oni estas konservinta tiun fetiĉismon por la almilitantoj, tiun ĉi blindan kaj infanan admiradon por tio, kion oni nomas la militista genio!

P. LEROY-BEAULIEU.

* * *

Fine, mi volas fini per la penso tiel vera, kiel originale imagita de Angla publikigisto, kiu vivis de 1611 ĝis 1677:

» Metu malgrandajn hundojn en sakon kaj skuu la sakon; ĉiuj hundoj mordos unu la alian; venos al neniu la ideo mordi la manon, kiu ilin skuas. «

HARRINGTON.

* * *

# KONKLUDO

Ni povu, per tiu mallonga kaj modesta raporto de ideoj pri la Patrujo, la Armeo kaj la Milito, esti konvinkintaj kelkajn el tiuj, kiuj estis ankoraŭ trompitoj per vortoj, tial ke oni ilin instruis malvere pri la amo al la Patrujo, tial ke oni igis ilin kredi la belecon de l'Militarismo, la utilecon de l'disciplino, la grandecon kaj la neceson de la Eŭropaj aŭ koloniaj militoj!

Ni povu precipe esti instigintaj al la pripenso tiujn el niaj kamaradoj, kiuj estus akceptintaj ĝojkore la oferon de sia vivo, por la Patrujo, tiu idolo, kiu staras nur per nia nesciо kaj nia malkuraĝeco!

Ni povu esti eltirintaj el la cerbo de kelkaj el niaj mizerfratoj la antaŭjuĝojn kaj la absurdojn, kiujn penis por tien meti kaj por tie kulturi ĉiuj atrofiistoj de cerboj parolantaj je la nomo de la Religio, de la Familio, de la Patrujo, de la Regno!

Ni povu fine esti montrintaj, ke la savo estas en ni!

Tiel ne estas la kongreso por la Paco okazinta en Hago, naskita de la Caro — tiu tirano kiu skurĝas, pendas, malliberigas, ekzilas aŭ mortigas ĉion tion, kio, en sia imperio, kuraĝas pensi, ĉiuj filantropoj nek ĉiuj liberaj burĝoj kunigataj kiuj povas doni la Pacon al la mondo.

Ĉe la momento de la kongreso, militame oni zorgis ĉie: la efektivajoj, la budĝetoj kreskis neordinare; Finlando suferis aŭtokratismon pli maldolĉan ol antaŭe; Britlando faris al Transvaalo la militan promenadon, kiu tiom kostis al ĝi, kaj kiu sukcesis por fari el Britlando, lando ĉiam opiniata kiel la plej gastama kaj la plej tolerema, hejmon de bruta ŝovinismo. Tiuj, kiuj parolis kontraŭ la milito, en tiu lando de libereco de parolo, riskis sian vivon en ĉiu momento. Fine, oni scias, kio okazis en Ĥinlando, kie la Eŭropaj armeoj fratiĝis por la ŝtelo, la malrespekto kaj la mortigo. La rivero Amur ne havis sufiĉe da ondoj por kaŝi la suferantojn faritajn de la soldatoj.

La Paco ankaŭ ne povas veni de ĉiuj, kiuj revas por vidi la armeon anstataŭitan de gardistaroj. Oni per tio ŝparus 287,260.000 frankojn.

Sed tio estas la sola profito, ĉar la militservado eligita estus sendube anstataŭita de la teoria kaj praktika milita edukado de la junuloj kaj la konservado de tiu instruado inter la gardistaroj daŭrus ĉiam por tiuj, kiuj estus anoj el ĝi. La militarismo ne estus multe plimalgrandigita. Cetere, ĉu la Belgaj gardistaroj ne pafis sur la strikistojn kaj la elmontrantojn, kiuj postulis la Universalan Voĉdonadon? Ĉu la Svisaj gardistaroj ne same faris kontraŭ la strikistoj, oficistoj de la tramvojoj kaj aliaj?...

Necesa estas plibona edukado. La nuna instruado diferencas tre malmulte de la religia instruado. Kiel tiu ĉi ĝi bestigas. Religio aŭ Patrujo, tio estas egalvalora. Fari la krucsignon aŭ saluti la standardon vidigas la saman kompatindan spiriton.

Estas necese, ke ni konfidu nur al ni mem.

## Konsiloj al la Rekrutoj

Junuloj, plenaj je fortikeco kaj sano, kiuj estos elŝirataj el viaj laboroj, el viaj esperoj, el viaj amoj.

Junuloj, kiuj tuj kelkajn jarojn vestigos per la livreo de l'honoro (tiel oni nomas la livreon de la sklaveco aŭ de la krimo.)

Junuloj, pripensu pri tio, kion vi devas fari! Havu volon!

Se vi kredas, ke vi ne povos suferi la arogaĵojn, la insultojn, la malspritaĵojn, la punojn kaj ĉiujn hontindaĵojn, kiuj vin atendas en la soldatejo : **Forlasu!** (1). Tio estas pli bone ol servi por amuzado al la alkoholulaj ekzekutistoj

---

(1) La forlasado tute ne estas praktika escepte por tiu, kiu posedas vivrimedojn permesantajn al li esti sendependa. Tiu, kiu tiel decidas devas do longatempe pripensadi pri la multaj malhelpaĵoj, kiujn ĝi havigas.

Ni opinias, ke revoluciulo, kiu forlasas estas perdata por nia kaŭzo, pro la leĝoj pri la fremduloj. Li estas tute speciale observata. Tuj kiam li konigas sian opinion, li estas eksterigata.

Pli bone ol forlasi la armeon, estus kvazaŭ ne koni la soldatejon. Sed la rimedoj por detrui la armeon kaj la militarismon devas esti lasitaj al la individua elekto.

R. de la T.

kaj furiozaj frenezuloj, kiuj zorgaĉus pri vi en la militaj malliberejoj.

Se vi kredas, ke ne estos tie propagando de ribelo por fari en la soldatejo, se vi kredas, ke tiu ĉi propagando ne valoras tion, kion vi riskas por ĝin fari; kaj se vi kredas, ke estus al vi neeble pasigi tie kelkajn jarojn ne farante tiun propagandon, kiun vi juĝas nefruktoporta kaj kiun vi juĝas pereiga por vi : **Forlasu !**

Per viaj sindikatoj, per viaj korporacioj, per via borso de de laboro, estos farota al vi la tutan eblon, por ke vi havu moralan kaj monan apogajon. De ili, vi estos ricevataj frate en fremdlando kaj vi ekscios tiel, ke la Patrujo estas ĉie, kie estas homoj, kiuj batalas, pensas, suferas, laboras, esperas kaj ribelas kontraŭ la sociaj maljustajoj.

Sed se la amo de tiuj, kiuj vin ĉirkaŭas, se la timo de la nekoneco, de ĉio tio, kio povas vin atendi pri enuoj kaj mizeroj en lando kies nek morojn, nek lingvajon vi ne konas, se aliaj kaŭzoj ankoraŭ superas vian teruron pri la regimento : **Iru tien !** Sed faru vian eblon por ke vi restu homo. Venku viajn tedojn. Igu ami vin de viaj kompatindaj kunvivantoj de la sklaveco kaj propagandu individue. El la lernejo de la krimo, faru lernejon de ribelo. La ĉiutagaj faktoj vin helpos por tio. Revenante, vi povos konigi tion, kion vi estos vidinta aŭ suferinta. Precizigante la faktojn, vi donos tiel vian kuraĝan baton de pikfosilo al la disjetado de tiuj subteniloj, sur kiuj sin apogas plej la socia konstruajo.

Cetere, vi ne estos la unuaj por agi tiel. Aliaj jam tion faris.

## Admonadoj al la Soldatoj

Dum jaroj vi estas ensoldatejigitaj, eligitaj el la mondo, kiu produktas, kiu vivas. Vi estas maŝinoj. Vi ne devas respondi al la insulto la plej maldelikata de kia ajn malspritulo, kiu portas unu aŭ multajn galonojn. Al la ordonoj la plej idiotaj vi devas obei ! Ĉio tio estas bestiganta.

Tamen, ne vin senkuraĝigu. Iru, en la borsojn de laboro, iru en la bibliotekejojn kaj popolajn universitatojn. Tie nur vi trovos sinceran amon kaj la plej fratan akcepton. Tie vi forgesos la vivon de soldatejo, ĝiajn malvirtojn, ĝiajn ridindajojn, ĝiajn kruelajojn.

Se iam vi devus batali kontraŭ la malmiko, malefeliĉaj

fratoj, ekspluatatoj de alia lando, vi scius agi konscie kaj fari tion, kion diktus al vi via prudento.

Se iam vi devus batali kontraŭ la kamaradoj, kiuj batalas kontraŭ la mastra rabemeco, kiuj postulas iom da bonstato, iom da libereco, vi scius ankaŭ tion, kion vi devas fari.

Kolonelo de Saint-Remy (1), kies profesio estis militisto; kolonelo de Saint-Remy, kiu akceptis en plena libereco fari la metion de mortigisto da homoj, de ekzekutisto sangavida de la ordonoj de la Registaro, trovis la malseverecon de milit-juĝejo, **tiel severa por la negradaj soldatoj**, ĉar li ne obeis, dirante ke lia konscienco de kristano malpermesis al li ofendi aliajn kristanojn.

Nu! kamaradoj, via prudento devas malpermesi al vi, ke vi mortigu aliajn homojn, viajn similajn. **Vi rifuzos obei, se oni volas fari el vi mortigantojn!**

Via konscienco de laboristoj malpermesas al vi, ke vi pafu sur aliajn laboristojn.

Se oni vin sendos en la strikojn:

**Vi ne pafos!**

Oni volas fari el vi maŝinojn por mortigi?... Ribelu! kaj tremu fine tiuj, kiuj kuraĝas vin armi kontraŭ viaj fratoj, **ĉar via malamiko estas nur tiu, kiu vin ekspluatas, vin subpremas, vin ordonas kaj vin trompas!**

Se oni volas absolute, ke vi estu mortigantoj per la armiloj metitaj en viajn manojn, **ne estu fratmortigantoj!**

Por la Federala komitato de la Borsoj de Laboro,

*La Sekretario*,

**Georges YVETOT.**

---

(1) Franca kolonelo, kiu rifuzis forigi la religiulojn post la leĝo pri la forigo de la religiaj asocioj.

R. de la T.

---

Presa komunista Societo *L'Émancipatrice*, 3, rue de Pondichéry, Paris 15a (Franclando).

**Legantoj!**

**BALDAŬ APEROS**

## *"Tutmonda Socia Revuo"*

Internacie redaktata kaj ilustrata

Pri ĉio, kio interesas la homaran vivadon

*Por ricevi la unuan numeron sendi 1 frankon al S^ro^*

**M. VEREMA**

**N° 4967 Central**

GENÈVE (SVISLANDO)


HISPANA ESPERANTO-MUZEO
10ª B. P. R. 1968
B. 54 1055

Presa komunista societo « L'Émancipatrice », 3, rue de Pondichéry
Paris 15e (Franclando).